Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal
11

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung
Aperas monate
Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 4-6
3-a JARO
APRILO-JUNIO 1948

EL LA ENHAVO:

Nektaro de l' vivo
Pensoj sub la stelara ĉielo
La sonĝo de sinjoro Tŝaska
La arbarlernejo en Alpl
Esperanto kaj stenografio
Historieto el Salmannsdorf
La Esperanto-movado en Austrio
Informoj de la Laborista Esperantistaro
Katolika Esperanta Vivo
Bibliografio

LASTA INFORMO:

La Aŭstria Esperanto-Kongreso 1948 okazos en Linz inter la 12.—15. de Aŭgusto 1948. Kongreskotizo 10.— ŝ, por familianoj 5.— ŝ. Pluaj detaloj sekvos. Preparu vin jam nun por la kongreso!

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- au eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4.—, por eksterlandanoj 4 int. respondkuponojn. Ni petas skribu la adresojn nepre bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Anglujo. — S-ro Albert B. Morgan, 57 Copthall Road, Birmingham, deziras vienajn bildkartojn.

Aŭstrio. — S-ro Johann Kainz, instruisto, III., Adamgasse 22/23, Vieno, serĉas konversacion kaj korespondadon.

E-fakgrupo de popolkleriga instituto en Vieno deziras korespondi kun tuta mondo — komencantoj kaj perfektuloj — pri ĉiuj temoj (il. pk., letere, filatelo). Estro Hugo Kraus. Vieno 110., Salierigasse 25.

Ĉehoslovakujo. — S-ro Jaroš Stanislav, Mlada Boleslav, Okuczni 531/II, serĉas por 6 junaj kursanoj koresp. kun aŭstriaj geknaboj.

S-ino Erna Köhlerova, Dolni Postevna 160, okres Sluknov, maljuna E-istino, kor. kun Vienanoj.

Egiptujo. — S-ro Dino Dukas, a Mustafa Khadem, (Camp Cesar), Alexandria, dez. kor. kun viena fraŭlo aŭ fraulino.

Francujo. — S-ro J. Gendrier, Cormeray (Loir et Cher), serĉas por kursanoj kor. kun Vienanoj. Indiku aĝon kaj profesion.

Germanujo. — S-ro Pfeiffer Heinz, Halle (Saale), Merseburgerstraße 1/62, E-isto depost 1927, serĉas aŭstrian koresp.-amikon.

S-ro Kurt Hoeber, (17 a) Heidelberg, Postfach 30, interŝ. L kaj PM kun ĉ. l. Mi petas la ŝanĝproponojn.

S-ro Heinz Grimm, Leipzig — S 3, Waisenhausstraße 23, pref. kor. kun aŭstrian(in)o pri arto, muziko, literaturo. Mi kor. ankaŭ kun aliaj landoj.

S-ro Anton Kammerer, (13 b) München 2, Marienstraße 11/I, kor. kun eksterl., ges-anoj junaj.

Hispanujo. — S-ro Jaime Juan Forne, Dr. Ferran 27, Alfafar, Valencia, kor. kun tutmondo per ilustr. Pk.

Nederlando. — Ges-joroj Dirk de Jong, Laanweg E 9, Harenkarspel, 31 j. edzo kun edzino, dez. kor. pri Aŭstrio.

AŬSTRIA
ESPERANTO-REVUO

3-a jaro | APRILO / JUNIO 1948 | n-ro 3—6

Nektaro de l' vivo

Parolado farita la 15an de Februaro 1948 ĉe kulturfesteto de la Viena esperantistaro.

Kiam homido disiĝas de la suferanta patrina korpo, ĝia unua vivosigno estas laŭta vekriado, kvazaŭ la infano jam scius, ke atendas ĝin vivo de doloroj, mizero, malsanoj, malamo kaj bataloj kaj finfine la morto.

Pesimistoj asertas: La vivo ne valoras la vivadon!

Sed rigardu la suĉinfanon, kiam ĝi estas trinkinta ĉe la patrina mamo kaj sata ekdormas: Kia esprimo de kontenteco respeguliĝas sur la vizaĝeto! Kaj post ioma tempo vidiĝas la unua rideto; esprimo de feliĉo! Ĝojo viviĝis en la malgranda koro.

Kaj de nun la tuta vivo estas miksita vico de doloroj kaj ĝojoj, de ploro kaj rido.

Ĉu vi estas pesimisto? Vi pravas, ĉar la vivo estas pli malpli longa ĉeno de doloroj, mizero, larmoj.

Ĉu vi estas optimisto? Vi pravas, ĉar la vivo estas pli malpli longa ĉeno de ĝojoj, feliĉo, plezuroj.

Ekzistas profetoj, kiuj diras: Ho homfratoj, ne ĝoju! La tero estas valo de mizero. Ĝojo ne indas al la homoj!

Sed vokas la poetoj: Ĝoju pri la vivo! Ĝojo estas donaco de dioj! Ĝuu la ĝojojn, ho homfratoj!

Kiuj pravas? Al kiuj ni obeu?

Ĉiu homa okazaĵo estas sencoplena, diras la filozofoj: do sencoplenaj estas la doloroj, sencoplenaj estas ankaŭ la ĝojoj. Kaj pri la senco de la ĝojo ni parolu hodiaŭ!

Por resti vivanta kaj funkcianta, la homa korpo bezonas certan kvanton da kalorioj. Ni devas perlabori nian nutraĵon, kuiri ĝin, mueli ĝin per la dentoj, gluti ĝin kaj plenigi la stomakon. Ĉio tio postulas laboron, penadon, energion. Sed kiam ni faras tiun laboron, la naturo donas al ni premion: la ĝojo de la bongusto estas la premio de la naturo aŭ, se vi preferas tiun vorton; premio de Dio pro la plenumado de Lia volo.

Por ke la homaro ne ekstermiĝu estas necese naski idojn. Kiu virino estus preta al la doloroj de la naskado, preta al la penplena laboro de korpa kaj spirita edukado de la infanoj; kiu viro estus preta al la multaj oferoj, kiujn kaŭzas la fondo kaj gvidado de familio, se ne la naturo, se ne Dio estus doninta al ili la ĝojon de la seksa kuniĝo, la ĝojon de familia feliĉo?

Jam tiuj du ekzemploj de primitivaj ĝojoj pruvas, ke la ĝojoj estas premioj pro plenumitaj devoj. La ĝojo de scienculo pri nova ekkono, gajnita post animstreĉa laboro kaj rezigno pri multaj pli primitivaj ĝuoj same estas premio kiel la ĝojo de artisto pri lia verko. Ju pli da rezignoj je primitivaj ĝojoj postulas plenumo de ia devo, ju pli da laboroj kaj penadoj ĝi kaŭzas, des pli valora estas la premio, des pli altnivela estas la ĝojo.

Ĝojo estas la motoro de nia agado, la risorto de nia vivo. La kapablo senti ĝojon estas la instigilo al ĉiu homa progreso.

Mi bedaŭras vin, ho homfrato, se vi n e evoluigis en via animo la kapablon, senti la multvariajn ĝojojn de la vivo. Mi bedaŭras vin, se vi nur konas la ĝojon pri bongusta manĝaĵo kaj pri seksa kuniĝo. Milmiloj da ĝojoj restas al vi nekonataj!

Rigardu la miraklon de la homa okulo! El la ondoj de la etero ĝi sorĉe faras la multvarian mondon de la koloroj kaj ebligas al ni la ĝojon pri la blua ĉielo, la ora suno, la arĝenta luno, la sepkolora ĉielarko, pri la diverskoloraj floroj, pri la verdaĵo de herbejoj kaj arbaroj, pri la belokulo de via amikino; ebligas al ni la ĝojon pri la majstroverkoj de Rafael kaj Leonardo, de Dürer kaj Rembrand, de Schwind kaj Waldmüller.

Kaj rigardu la miraklon de la homa orelo! Ĝi sorĉe faras el la ondoj de la aero lo mondon de la sonoj kaj ebligas al ni la ĝojon pri la belkantado de la birdaro, pri la dolĉa parolo de la patrino, pri la amkonfeso de via amanto, pri la diodonaco de la muziko: la verkoj de Haydn kaj Mozart, de Schubert kaj Schumann, de Lanner kaj Strauß, de Wagner kaj Grieg.

Ho miraklo de la homa cerbo, organo de la intelekto! Ĝi levas nin el la vico de la bestaro kaj faras nin diosimilaj. Ĝi ebligas al ni ekkoni la sekretojn de la naturo kaj kreas la verkojn de la filozofoj, de la scienculoj, de la poetoj. Ĝi kapabligas nin ĝoji pri la verkoj de Homer kaj Dante, de Calderon, Moliere kaj Shakespeare, de Schiller kaj Goethe, de Byron kaj Tolstoj; pri la verkoj de Plato kaj Aristoteles, de Kant kaj Bergson.

Ho miraklo de la homa koro, vi unika organo de la ĝojo! Vi organo de la plej feliĉiga sento de la homo: vi centro de la amo! Kiel malĝoja estus la homa vivo sen amo! Sen amo de la patrino al la infano, sen amo

de la infano al la gepatroj, sen amo al amikoj, sen amo de la geamantoj, sen amo de la geedzoj, sen amo de la viro al lia verko!

Miaj homfratoj: Vi volas ĝoji, ricevi ĝojojn! Pripensu, ke la plej alta ĝojo estas ĝojigi la homojn, kiujn vi amas kaj kiuj vin amas. Ricevi ĝojojn kaj donaci ĝojojn: tio estas la feliĉiga pulsado de amanta koro.

Nur en serena koro povas loĝi la plej altaj ĝojoj, en koro senpeka.

Ho vi grumblulo! Kiu donas al vi la rajton, pereigi la ĝojon en la koro de viaj proksimuloj? Vi nur disvastigas froston kaj en via ĉirkaŭaĵo la ĝojoj velkas kiel floroj velkas, kiam la norda vento alblovas ilin. Foriru el la homa societo kaj grumblu kiel izolulo en via ĉambro. Vi ne donas ĝojon kaj tial ne miru, ke neniu ĝojigas vin!

Benataj estu la homoj, kiuj ĉie disvastigas ĝojon, elradias ĝojon, ĉar ilia koro estas plena de amo. Ili estas la favorataj idoj de l' Dio.

Homfratoj: Malfermu vian koron al la ĝojo! Ĝoju kaj ĝojigu! Brilas super vi via frato la suno, via fratino la luno, viaj gefratoj la steloj! Al via ĝojo Dio disponigis sian verkon la mondon: la florojn, la bestojn, la arbarkovritajn montojn, la herboriĉajn valojn, la muĝantajn riverojn. Li donis al vi amikojn, amatinon, edzinon, gefilojn! Ĝoju pri la mondo kaj via ĝojo laŭdu la kreinton!

Ho homfratoj: Trinku plenbuŝe la nektaron de l' vivo, la ĝojon, kaj prezentu la pokalon al viaj proksimuloj!

F. J.

Literaturo

F. V. Schöffel:

Pensoj sub la stelaro

Malvarmeta septembra nokto, traspirata de l' aromo de herbejoj pro roso malsekaj kaj de l' terodoro de ĵus plugitaj kampoj, etendas sian silke trateksitan bluegan mantelon super la ĉarma monteta pejzaĝo kronita de malgrandaj arbaretoj. Super tio, travidebla kiel vitro kaj sennuba, arkaĵiĝas la ĉiela kupolo surmetita de steloj.

Mi staras sur la balkono de malgranda, sur monteto konstruita kampodomo kaj mia rigardo penetras en la blunigran profundon apud miaj piedoj, kiu ŝajnas esti senfunda, kvankam nur iometa profunda rondvalo estas plenigata de mallumo. Komparo kun la profundo de l' anima fundo min trudas. —

Nenia aerbloveto moviĝas, preskaŭ korpremante efikas la senspira mistera silento. La oreloj aŭskultas soife en la sensonecon. Kaj jen ili aŭdas mallaŭtan muĝadon sonantan kvazaŭ el markonko, metita al la orelo. Al la infanoj oni rakontas, ke tio estas la marmuĝado, kiun la konko retenas kaptita. Tio, kion mi aŭdas, estas la sangofluo, kiu tramuĝas la vejnojn, la vivo laŭtiĝas en la sensona silento. Mia malgranda limigita mondo, la mikrokosmo, fariĝas aŭdebla, kiam ĉio ĉirkaŭe mutiĝas kaj de supre la eterna silento pezas sur la teron.

Kaj mi levas la rigardon supren. Sennombraj steloj trembrilas super mi. El senmezuraj malproksimaj miloj da mondoj sin respegulas per la okulo en mia „malgranda“ mio. K i a n e k o m p r e n e b l a m i r a k l o ! La homa animo ampleksas la universon, kiu sin spegulas en la okuloj de ĉiuj eĉ plej etaj estaĵoj. Se v i ne estus — ne estus mi, se ekzistus nenia vivanta estaĵo, la senmezura mondo n e e s t u s, ĝi nur vivas en la spegulo de l' vivo. La eterna spirito ĝin envolvus kaj konceptus ĝian esencon, sed la kreaĵo nenion scius pri si. —

Iu moskito siblante flugas preter mia orelo kun mallaŭta altsonanta kantotono. Kiel eta estas tiu estaĵo, tiu neniom da substanco kompare al la gigantaj universaj korpoj ĉi-supre, la materiaj kolosoj, kiuj milope lumas malsupren! Tamen, kiom pli multe signifas la kuleto ol la gigantaj senvivaj kolosoj da kompakta materio!

Kiom signifas spaca grandeco kaj pezo kompare al la fajrero da vivo!

Ĉar tiu neniom da substanco, kiu bruete flugas tra la mallumo, enhavas v i v o n ! Sed vivo estas fajrero de l' eterna fajro. Vivo estas la kosma konscio ripozanta kaj vekiĝanta en la kreaĵo. Vivo estas la sentado de l'ĉeesto de Dio, ĝi estas la portanto de l' s p i r i t o !

Ankaŭ la fajrero da vivo en la herba trunketo, eĉ la herbotrunketo mem, estas pli ol elardinta senviva sunego. Mortinta stelo — senmezura tombo de forto!

Nur kiam el malvarmetigita sunardo en la boletanta marĉo la unua vivo sin movas en la amebo, vekiĝas tiu enkatenigita senmezura forto! Kia m i r a k l o kaj eterna sekreto! Simile al „dornrozeto“ *) la fajrero dormas en la ensorĉita kastelo de l' materio, ĝis kiam la mateno ĝin vekas, la neniam mutiĝanta: E s t i ĝ u !

La songo de sinjoro Tsaska

De **Eugeniusz Matwiejczuk.**

Sinjoro Hipolito Tŝaska vekiĝis malseka tutkorpe de malvarma ŝvito ek de la piedoj ĝis la kapo. Ie sub la palpebroj flirtis la restaĵoj de timiga sonĝvizio. Se ni konsideros, ke sinjoro Tŝaska, edzo de la

*) Sorĉe dormigita princidino en germana fabelo.

korpulenta sinjorino Agata, unu inter malaltrangaj helpantoj de la ĉefa librotenisto en Industria Karbo-Centro en W., ĉiam laborokupata en la oficejo, terorumata de la edzino hejme, se ni, kiel dirite, konsideros, ke sinjoro Tŝaska estis ofte havanta profetajn sonĝojn, kiuj plejparte efektiviĝadis por lia malutilo, tiam ni certe komprenos lian konstantan deprimon kaj senĉesan ĉagrenemon. La petolema, malica sorto ofte tro persekutas siajn viktimojn . . .

— Nu, kial ci gapas, kiel? . . . ekkriis vekiĝinta de sia dolĉa, matena dormo sinjorino Agata; sed ŝi ne ricevis respondon. Nia heroo estis tro konsternita de sia malbonaŭgura sonĝvizio, por povi respondi je la demando de sia edzino. Imagu nur: jen iras nia sinjoro Hipolito sur vojmezo (kompreneble — ĉio estas en sonĝo!) suno lumas, paseretoj ĉirpas, el defluiloj gutas akvo — iras nia sinjoro Hipolito, iras . . . iras . . . ĝis jen subite el unu flanka kajeto elkuras tia granda, flavruĝa hundo. Kaj imagu, tiu hundo ĵetiĝas subite sur nian sinjoron Tŝaska sen ia ajn kaŭzo kaj komencas mordi lin ĉiuflanke . . . ŝutiĝas viloj, plumoj, ligneroj . . . ŝprucas la sango . . . sinjoro Tŝaska intencas forkuri, intencas serĉi ian ajn savon kontraŭ la sangavida bestaĉo, sed vanaj estas liaj fortostreĉoj; la dentegoj de la flavruĝa hundo tenas lin forte, tre forte . . . malfeliĉa nia heroo uzas superhomajn ekpenojn — saaavooon!! — li sukcesis nur ekkrii kaj — — vekiĝis.

— Nu, kial ci gapas, kiel . . .?!

— Jes . . . jes . . . mi komprenas — la cerbo de sinjoro Tŝaska laboras febre — mi komprenas . . . memkompreneble, ke tiu flavruĝa hundo signifas neniun alian, nur mian ĉefon . . . sinjoron Krupa . . . nur lin, nur lin . . . Nur sinjoro Krupa, tiu damninda ĉefo Krupa havas la ruĝflavajn harojn . . . nur li. La animo de sinjoro Hipolito mortetas en antaŭsento de minacanta danĝero. Li bone komprenas la mistikan signifon de la horora sonĝvizio, la faktoj de efektivo entute ŝirmiĝas kun la momentoj de sonĝovidaĵo: sinjoro ĉefo Krupa, kiel sciate, ne ŝatas speciale nian heroon, ĉiam krias al li, ĉiam grumblas, ĉiam nomas lin sentaŭgulo kaj minacas lin senlaborigi. Nia sinjoro Hipolito timas sinjoron Krupa'n panike, timas lin, kiel sian senperan superulon . . . li timas lian minacan rigardon, liajn akrajn, mokplenajn vortaludojn . . . la fantomo de postenperdiĝo pendas super nia malfeliĉulo. Li jam estas ellitiĝinta, lavita, kombita, preta por foriro, kvankam pika eksento de maltrankvilo ne forlasas lin eĉ pormomente. — Nun mi ne havas tempon — li diras al sia edzino — mi tute ne havas apetiton, mi manĝos tion poste — en kancelario . . .

Li prenas el la manoj de sinjorino Agata la du en gazeton volvitajn kotletojn (lia ĉiutaga matenmanĝo) kaj forkuras. Baldaŭ jam la oka, sinjoro Hipolito scias, kio lin atendas, se li malfruiĝos, do rapidas tutforte . . .

— Tiu flavruĝa hundo, tio — la ĉefo, tio — sinjoro Krupa. Hodiaŭ mi neeviteble havos kun li iajn malagrablaĵojn — laboras febrece la pensoj de nia heroo.

— Estu Divolo . . . kion mi povas fari . . . tia mia sorto . . ,

— Subite . . . kion ĝi . . .?

— El unu el la flankaj kajoj elkuras neatendite granda, flavruĝa hundo . . . ĝi terure dentogrincas, murmuras, turnas ĉiuflanken la dentarmitan buŝegon . . . tute same, kiel en la sonĝo. Sinjoro Tŝaska provas forkuri . . . vane . . . Ĉio agiĝas akurate, kiel en la sonĝo. Ŝutiĝas la viloj el la disŝiritaj je pecoj pantolonoj, el la vundita karno fluas la sango . . . ĉio agiĝas same, kiel en la sonĝo . . . mankas nur ligneroj kaj plumoj . . .

— Sed jen la lasta akto de tragedio finiĝas. La sangavida bestaĉo foriras malrapide, murmurante terure kaj serĉante novajn viktimojn...

— Sed tiumomente en la animo de sinjoro Tŝaska malgraŭ pika doloro, kiun li sentas en la vundita femuro, malgraŭ honto, sentata pro la disŝiritaj pantalonoj, en la animo de sinjoro Tŝaska, mi ripetas, regas ĝoja ekscitiĝo kaj ĝuiga eksento, ke la sonĝo jam e f e k t i v i ĝ i s, ke li ne plu bezonas timi sian ĉefon:

Nun mi komprenas — li ĝoje vokas — ke tiu ruĝflava hundo, kiu estis min mordanta en la sonĝo, tute ne signifis mian ĉefon . . . ĝi signifis tiun alian, efektivan hundon, kiu min nun tiel dolorige mordis en femuron. — Mia kara hundeto, mia hunĉjo — — — iru al mi, iru — — —

Sinjoro Tŝaska postkuris subite, kiel freneziĝinta la malproksimiĝantan hundon kaj atinginte ĝin, ĵetis al la mirigita hundo siajn du, sur bona porka graso rostitajn kotletojn:

— Manĝu, kara hunĉjo, manĝu por sano . . .

La arbarlernejo en Alpl

En la regiono de la aŭstria verkisto Peter Rosegger

Malproksime vojaĝintoj antaŭ la lasta milito rakontis al ni, ke en kelkaj lokoj de la mondo ekzistas homoj, vivantaj plu en la paradiza prastato de perfekta kontenteco, lastaj insuloj de feliĉego: sur la insulo Bali flanke de la turistaj vojoj, ĉe la triboj de la Maori sur Novzelando; ankaŭ Traven en siaj belaj libroj rakontas pri indiantriboj en la forega meksika altregiono, kiuj en naturinterligita frata harmonio feliĉege vivadas.

Certe ankaŭ en la turmentita Eŭropo sporade ĉi tie kaj tie ekzistas tiaj ankoraŭ ne konataj idilioj, unu eĉ en la proksimeco de Vieno. Ĝi estas la arbara lernejo de Alpl ĉe Krieglach en la Stiria arbara regiono,

fondita de Peter Rosegger antaŭ 45 jaroj. Tie la instruisto kaj infanoj meze en la grandioza pejzaĝo vivas en preskaŭ perfekta komuneco. Certe en Aŭstrio ekzistas ankaŭ aliaj modelaj lernejoj ĉiuspecaj, sed apenaŭ ie ŝajnas esti tiel favoraj cirkonstancoj koncerne sukcesplenan edukadon, kiel en Alpl.

Sed Alpl tute ne estas vilaĝo en la kutima senco; la tiel nomita vasta, sed treege sporade surloĝata parto de la foirvilaĝo Krieglach konsistas el multaj dense arbkovritaj valoj kaj montoj altaj inter 800 kaj 1200 metroj, sur kiuj en granda distanco, unu de la alia, situas sporade kelkaj kampulaj domoj kaj gastejoj. En la tuta komunumo loĝas ducent kvindek homoj, inter ili kvindekkvar lernantaj infanoj. Ili ĉiuj venas — kia avantaĝo por la lernejo — el simila socia medio. Preskaŭ meze en la montsovaĝejo situas en valgrundo la arbarlernejo, firma lignokonstruaĵo en la stilo de svisa domo. Ĝia kapo kaj koro estas la ĉefinstruisto Kandler, kiu gvidas la duan klason, en kiu estas la dek - ĝis dekkvar - jaraĝaj, dum la juna instruistino Kaltenbrunner instruas en la unua klaso la ses - ĝis dekjaraĝajn.

En tiu ĉi arbarsoleco, en kiu nenio alia memorigas pri la moderna civilizacio krom la elektra fluo, ekzistas la plej progresinta lernej-demokratio. La ĉefinstruisto verkis kun siaj pli grandaj lernantoj lernejan konstitucion, kiu ne konas la vorton „devi". Ĝi per grandaj literoj estas skribita kaj bone videble pendas sur la pordo de la klas-ŝranko. La vizito de la lernejo estas ĝoje rekonita rajto, la disciplino estas komprenata kiel nepra neceso por bona komuneco. Porhejmajn taskojn kaj punojn oni ne konas en ĉi tiu lernejo.

Kiu unufoje partoprenis tiun instruadon, rapide lernas kompreni tion. La instruisto scipovas prezenti en intuaj detaloj la lernotaĵon, kiun li intencas enmemorigi al la lernantoj kaj ĉiam uzante la jam konatajn aferojn, li divenigas al la lernantoj la lernotajn. Tiamaniere la infanoj vere ludante lernas. Estas do la malnova ruzaĵo de la peda-gogo, kiu kredigas la infanojn, ke ili lernas solaj, sed envere ili tamen ĉiam pendas sur la direktfadeno de la instruisto, kiu nur lerte kaŝas tion, dum la direktfadeno en la mano de mallerta pedagogo fariĝas brileganta, videbla kondukilo. Estas ruzaĵo, kiu ŝajnas esti simpla, sed en kiu tamen estas enŝlosita ĉiu saĝeco de la instrureformo, kaj kiun scipovas apliki tamen nur la genia, la entuziasmigita instruisto. Al li la infanoj el Alpl dankas sian lernejvizitemon. Post festotagoj ili mal-pacience atendas la lernejmalfermiĝon kaj la semajnojn daŭrantan lernpaŭzon en la pasinta vintro ili preskaŭ ĉiuj sentis kiel veran malfeliĉon.

La lernkajeroj estas tiel nete kaj zorgeme skribitaj, ke oni opinias, ke nur ekzistas antaŭ oni elektitaj modellernantoj. La kovriloj estas ornamitaj per desegnaĵoj kaj pentraĵoj mem skizitaj. Poste ili dekla-

mas poemaĵojn: Knaboj, knabinoj, granduloj, malgranduloj en la skribgermana lingvo kaj en la stiria idiomo. Tio estas travivaĵo! Jen, kiel malgrandaj kampulaj knaboj kaj knabinoj, ĝustaj arbarinfanoj, libere kaj neĝenite majstras la severe en versoj ligitan lingvon. Neniam antaŭe mi aŭdis pli senteme deklami la poemaĵon „La horloĝo“ de Seidel („Mi portas kie mi iras ĉiam horloĝon kun mi“) ol tiam parolite de la dekkvarjaraĝa Alplanino en la arbarlernejo. Kiel ili kun fremdaj plenkreskuloj libere kaj senĝene parolas, tio faris min, la urbanon, iomete embarasita kontraŭ la kamparinfanoj.

La dua klaso ankaŭ eldonas la semajne aperantan „Arbarlernejan gazeton“. Ĝi konsitas el kvar paĝoj grandformataj kaj en ĉiu ekzemplero, ĉiu artikolo estas skribita de sia verkanto per presliteroj. Ĝi raportas pri la konferenco en Moskvo same, kiel pri la defaleginta bovo de alpla kampulino, pri la vojaĝo de lernantino al Graz (ĉefurbo de Stirio) kaj pri la feliĉa hejmenveno de alplano el la militkaptiteco. El la gazeto mi ankaŭ eksciis, ke ĉe la lasta baloto por la parlamento kvindeksep balotiloj estis donitaj por la socialistoj, tridekkvar por la aŭstria popolpartio kaj du por la komunistoj. En tiu ĉi soleca regiono tiom da kredo je la estonteco kaj tiom da fervoro dum la lernado de la infanoj. Ĉu tio estas bona signo por Aŭstrio?

El „Arbeiterzeitung“. Tradukis Loibel Gustav.

Esperanto kaj stenografio

Esperanto estas koresponda lingvo kun latinlitera skribo, legebla de ĉiu Esperantisto. De lando al lando vojaĝas leteroj, skribitaj de samideanoj, kiuj interŝanĝas simpatiesprimojn kaj komunikojn, ofte nur simplajn frazkolektojn, skribitajn sur malmultaj leterpaĝoj.

Sed la nuna tempo donas multajn pripensindajn spertojn, la homoj multe pensas, interesiĝas pri alilandaj okazintaĵoj, pritraktas plej diversajn ideojn kaj konceptojn. La leteroj fariĝas multpaĝaj kaj la temoj postulas antaŭnotadon kaj bonstiligan preparon. Oni perdas multan tempon skribante per la normalskribo.

Per stenografio pli rapidiĝas la skribado. Multe da stenografisistemoj ekzistas kaj ĉiuj nacioj havas diversformajn stenografiojn. La stenografio ja ne estas internacia kaj Esperanto ne havas ĉie konatan kaj uzatan internaci-stenografion. Oni provis enkonduki diversajn sistemojn: originalajn por Esperanto kaj alkonformigajn. Sed sensukcese, neniu sistemo fariĝis intersteno.

En la jaro 1936 aperis leterartikoleto en „Österreichische Blätter für Faulmann'sche Stenographie“, skribita de la japano Osamu Isiga el Tokio, en stenografia skribo:

Estimata sinjoro! Mi havas la honoron saluti vin kun granda respekto. Sinjoro Hilkersberger el Tirol instruis la stenografion al mi per du leteroj. Mi ne scias, ĉu la sistemo estas plej taŭga por Esperanto, sed mi jam povas diri, ke la sistemo estas facile lernebla por la japanoj. Eble pro la facile memoreblaj formoj de la sistemo. Mi deziras al vi bonan sanon. Sincere via Osamu Isaga.

Al tiu ĉi publikigita atesto mi aldonas mian personan sperton. Mi konatiĝis kun s-ano Hilkerberger en Landeck dum la antaŭjara fervojista renkontiĝo kaj interrilatas nun koresponde kun li. Hilkersberger instigis min lerni la Faulmann-an stenografion, kiun mi baldaŭ regis kaj ĝin nun vigle uzas en la korespondado kun la nomita s-ano kaj s-ano Hollerer en Aflenz, Stirio.

Dum 30 jaroj mi skribis la stenografion de Gabelsberger, per kiu mi ne povis fari notojn Esperanto-tekstajn, kion mi facile povas fari per la sistemo de Faulmann. La sistemon mi facile kaj rapide finlernis ne pro tio, ĉar mi jam estis stenografisto. La kono de la Gabelsberger stenografio komence eĉ ĝenis min pro la kontraŭsignifaj signoj de ambaŭ sistemoj.

La Faulmann-a stenografio estas progresa sistemo triforma: unue, la plenskriba formo sen sigeloj; due, korespondskriba kun plia mallongigo; trie, debatskribo. Aliaj sistemoj estas nur duformaj. La priparolita sistemo estas uzebla sen ŝanĝoj de signoj por ĉiu lingvo. Ĝi estus la ideala internaci-stenografio. Estus rekomendinde, se la Esperantistoj interesiĝus por la stenografio de Faulmann.

Alois Ramschak.

Franz Kubes:

Historieto el Salmannsdorf

Rakonteto pri la famkonata komponisto Johann Strauß

Al la suddeklivo de Dreimarkstein (monteto) alfleksiĝas Salmannsdorf (iama vilaĝo antaŭ Vieno). Kelkiu ĝin konas de ekskursoj, kelkiuj de la vizito ĉe Heurigen (vintrinkejoj). La dometoj estas verde cirkaŭkreskitaj, la tegmentoj parte ankoraŭ estas kovritaj de lignaj ŝindoj. Tiel ili staras kaj sunumas sian belan blankon meze de la vinĝardenoj, verdaj herbejoj kaj de la persikarboj, kies velurlumetaj fruktoj estas tre konataj. Malgranda preĝejeto revante rigardas al la arbaro.

Antaŭ ĉirkaŭ 90 jaroj iun matenon alvenis en tiun vilaĝon sufiĉe granda societo alveturigita de ĉevalveturilo. Al ili plaĉis la restado en Salmannsdorf tiom bone, ke ili ankoraŭ sidis malfrue vespere en unu el la malgrandaj vintrinkejoj. Okazis gajaj interbabiladoj kaj oni ankaŭ kantis. Nur io mankis: m u z i k o.

Subite malfermiĝis la pordo kaj eniris viro en meza aĝo. Li estis bonvestita kaj kompreneble ankaŭ havis la tiam laŭmodan barbon.

Ĵus ree bedaŭris la societo la mankon de muziko. „Se estas nenio alia“ diris la alveninto, „iomete mi ankaŭ povas ludi sur violono“.

La mastro estis petata alporti violonon, la fremdulo eksidis ĉe la tablo. Li babilis kaj trinkis kune kun la societo. La sinjorinoj estis entuziasmigitaj de li, sed la sinjoroj pro tiu kaŭzo memkompreneble iom malpli. Speciale unu el ili ĉagreniĝis, kiu ĝis nun havis la ĉefan parolon en la rondo. Post kiam la mastro estis alportinta la violonon, tiu sinjoro tuj invitis la fremdulon ludi ion antaŭ ili. Tiu ĉi ne longe afektis. Li ludis, ke ĉiu estis gaje kortuŝita kaj la piedoj de si mem komencis danci. Ĉiuj laŭte aplaŭdis pro la bonega ludado. Nur barono Widner retenis sin, sed tamen li frapetis la ŝultron de la muzikanto kun mieno de protektanto kaj diris akcente distingite: „Tre bone, kara amiko, tre bone! Iomete ja laike, sed — kaj li volis pruvi, kian grandan influon li havas — el vi ankoraŭ io povas estiĝi, kvankam vi ne plu estas junulo. Vi povas iufoje viziti min. — Sciu, al vi ankoraŭ mankas la percepto pri la interna valoro de melodio. La fingroj estas tute bonaj, sed — ekzistas nur unu instrumajstro, kiu inspirus vin, ke ankaŭ via koro kunludus: mia amiko Strauß.“

„Ĉu via amiko Strauß?“ demandis surprizite la fremdulo.

„Certe! Mia amiko Strauß. Ĉiutage li ĉe mi en - kaj eliras. Se vi emas, mi protektos vin. Eble mi sukcesos havigi al vi okupon en lia orkestro. Kompreneble mi ne povas promesi tion, ĉar, kiel mi konas Strauß, li pretendas tro multe de siaj muzikistoj. Ĉu vi estas tia, mi ne volas prijuĝi en ĉi tiu momento.“

Li postulis alporti plumon kaj inkon.

„Do vian nomon?“

La fremdulo estis embarasita. „Ekscelenco, mi ne sufiĉe kuraĝas, mi ja tute ne estas konata!“

„Sed, viro, tio ja estas rindinda!“ Li majeste ĉirkaŭrigardis en la rondo, iomete kraĉtusetis kaj daŭrigis: „Ne ĉiu ja povas esti tiel konata kiel mi!“

„Jes, tiuokaze ekscelenco, se vi nenion kontraŭas — mi mem estas Johann Strauß!“ Kaj moke li aldonis: „Sed espereble mi povos ankaŭ estonte ĉiutage ĉe vi en - kaj eliri!“ —

Kiam oni en Salmannsdorf dekstre supreniras malgrandan strateton, oni trovas nuntempe sur malnova simpla domo tabulon, kiu anoncas, ke ĉi tie loĝis la valsreĝo de la tiama tempo.

Esperantigis Mina Schober.

La virinoj de la mondo konsideratoj de soldatoj usonaj

Dum la milito kaj postmilitaj jaroj multaj soldatoj usonaj amrilatis de Japanujo ĝis Francujo kaj de Nordkapo ĝis Sudmaro.

La revuo „Weekend" okazigis enketon (informesploron) inter tiuj korrompuloj kaj publikigis kiel rezulton sekvantan tipologion virinan:

Holandanino: tre mastrumema, pura, sana, diligenta, pacema.

Francino: gaja, subridema, ellitiĝemulino plej frua, ŝparema, fidela.

Norvegino: blonda, laŭ-etiketa (ceremonia), drinkema pli ol viro.

Anglino: afabla, zorgema, hejmeca, sed ofte post la edziniĝo kontraŭeca.

Aŭstralino: gaja, bela, ino ne komparebla.

Ĉinino: la plej bona kuiristino, sed ĝi subridas ĉiam je okazoj nekonvenaj.

Sudmarinsulanino: ŝparema, ĉar ŝi ne portas multe da vestoj, bela, modesta, humila.

Germanino: mastrumema, nervoza, malsata.

Aŭstrianino: helppreta, ĉarma, gaja kaj tamen melankolia, sed ŝi estas pli bona ol ŝia famo.

Trad. Stefi Arbinger.

ESPERANTO-MOVADO en Aŭstrio

Aŭstria Esperanto-Kongreso 1948

12.—15. de Aŭgusto 1948, Linz a. D.

Ĉiuj partoprenintoj de la pasintjara kongreso ankoraŭ bonmemoras la belajn tagojn en Kufstein, kiuj la unuan fojon post dek jaroj denove kunigis la Esperantistojn el tuta Aŭstrio por serioze pritrakti ĉiujn aferojn de la enlanda Esperanto-movado.

Jam pasis preskaŭ jaro depost tiam kaj por 1948 invitis la agemaj s-anoj de Supra-Aŭstrio la Aŭstrian Esperanto-Kongreson en la landan ĉefurbon Linz. La ges-anoj de Linz jam formis Kongresan Komitaton, kiu zorgos, ke ankaŭ la nunjara kongreso estos same bone organizita kaj sukcesplena.

La ampleksa tagordo de la kongreso jam estis publikigata en la germanlingva bulteno de AEF kaj dissendata al al aŭstria Esperantistaro. En la kadro de la kongreso ankaŭ okazos la jarkunveno de la Societo de Amikoj al Esperanto kaj la novelekto de la estraroj de ambaŭ organizoj.

Kvankam reciproka vizito de landaj Esperanto-kongresoj al multaj ges-anoj pro la konataj internaciaj cirkonstancoj ĝenerale ne estas ebla, tamen kelkaj eksterlandaj s-anoj el Anglujo, Holando, Hungarujo kaj Ĉehoslovakujo jam anoncis sian partoprenon.

La ges-anoj kaj Esperanto-organizoj en tutmondo estas petataj, per alsendo

de kartoj kaj leteroj morale apogi la aŭstrian Esperanto-movadon. Adreso: Aŭstria Esperanto-Kongreso, komitatestro Karl Nigl, Prinz Eugenstr. 11, Linz a. D., Aŭstrio.

Unua Viena Esperanto-Konferenco
17. kaj 18. IV. 1948

Por informi la vienan Esperantistaron pri la ĝisnunaj laboroj kaj sukcesoj aranĝis la Viena Esperanto-Delegitaro la 17-an kaj 18-an de Aprilo n. j. sian „Unuan Vienan Esperanto-Konferencon".

Salutis post la malfermaj vortoj de ia estro de la VED, Emil Vokal, s-ano fed. eksministro Dro. Frenzel la ĉ-aŭ 300 partoprenantojn. Kiel eksterlandaj gastoj ĉeestis la ges-anoj Hönigsberg el Rumanujo.

La afergvidanto de la VED s-ano kalk. sekr. Raimund Cech, laŭtlegis la de kalk. konsil. Frey transdonitan salutleteron de ĝeneral-poŝt-direktoro dro Karl Dworschak, kiu kiel estro de la AEF-komitato por eksterlandaj aferoj, sin senkulpigis kaj atentigis la konferencanojn pri la klopodoj de s-ano Frey por efektivigo de la „Interŝtata Esp.-Kontrakto" kaj pri la de li iniciatita kolekto de UNO-deklaroj. S-ano Cech informis la kunvenintojn pri la agado de la VED depost la jaro 1945, kiu spite la grandaj postmilitaj malfacilaĵoj sukcesis restarigi preskaŭ ĉiujn antaŭ 1938 ekzistintajn vienajn E-grupojn kaj faksekciojn.

Koncizaj raportoj de la „Viena Esp.-Instituto", de la fak-grupoj de fervojistoj, junuloj, katolikoj, laboristoj kaj poŝtistoj kaj tiuj de la vienaj distrikt-grupoj komunikis interesajn faktojn de la interna agado kaj propagandaj sukcesoj.

34 vienaj ges-anoj estis pro sia 30-jara Esperantista membreco kaj pionira agado elektitaj en la „Honoran Komitaton de la VED", kiel esprimo de danko por iliaj ĝisnunaj klopodoj por Esperanto.

Pri estontaj taskoj de la VED parolis s-ano Emil Vokal, skizante agadplanon kaj vojon por ankoraŭ pli efika kaj pli aktiva agado.

Interesan referaĵon faris s-ano AEF-prezidanto dir. Paul Glüxmann pri la tasko de la viena kaj aŭstria Esperantistaro organizita en la „Aŭstria Esperantista Federacio", en kies kadro, ĝis nun sole, la Esperantistoj de ĉiuj politikaj kaj mondperceptaj medioj havas la eblecon harmonie kaj celkonscie kunlabori, en la ŝtatoj de la danub-vala centra Eŭropo. Fine referis dro Leopold Grimme pri la ĝusta gvidado de Esp.-grupoj.

Sekvis alparolo de la gasto s-anino Hönigsberg, kiu naskiĝis kaj longjare vivis en Bjalistok, la nask-urbo de nia Majstro. Salutojn de Esperantistoj el Triesto kaj Venecio transdonis s-ano Friedrich Ebner, kiu antaŭ ne longe estis tie. Per transdonitaj proponoj kaj sugestoj kaj vigla diskutado finiĝis la malferma kunsido. Samtage vespere okazis sub gvido de s-ano Jeitler amuza vespero.

La dua konferenca kunsido okazis dimanĉe la 18. IV. 1948 samloke. La unua parto konsistis el raportoj pri la pasintjaraj kongresoj kaj eksterlandaj aranĝoj, kiujn la vienaj samideanoj partoprenis. Unue raportis Rajmund Cech pri la „Aŭstria Esperanto-Kongreso 1947" en Kufstein, kaj atentigis la vienan Esperantistaron pri la ĉi-jara Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz (Supra Aŭstrio), la 12.—15. VIII. 1948.

La duan raporton faris s-ano Vokal, kiu ĉeestis la 32-an Universalan Esp.-Kongreson en Bern, kiel ano de la aŭstria delegacio. Li parolis ankaŭ pri la Hungara Esp.-Kongreso en Pecs-1947 kaj pri la Esp.-festsemajno en Zaandam-Nederlando, kiujn li ĉeestis kiel reprezentanto de la aŭstria Esperantistaro, kaj pri la pasint-jara S. A. T.-Kongreso en Aarhus-Danujo.

La dua parto de la kunsido estis „Zamenhof-soleno" okaze de la 31-a datreveno de la mortotago de la kreinto de Esperanto. Post enkondukaj vortoj de la sekretario de la Aŭstria Esp.-Instituto s-ano Ernst Werner, sekvis altnivela programo kun muzikaj kaj recitaj prezentaĵoj. La ĉefparoladon faris s-ano Nikolao Howorka, kiu en elokventa maniero atentigis la vienan samideanaron pri la persono kaj verko de dro Zamenhof, pri la spirita

valoro de la lingvo Esperanto kaj de ĝia homarana ideo. Li instigis la samideanojn al praktike-ideala uzo de la lingvo por diskonigi la kulturajn, ekonomiajn kaj sciencajn valorojn de nia lando.

La fino de la konferenco estis migrado al „Kahlenberg", la favorata ekskursmonto ĉe la Danubo. De 5 flankoj ekskursis pli ol 160 ges-anoj al sama celo. La bela vetero kaj la harmonia okazigo de la konferenco kreis amikan atmosferon. Mallonga programo, kiun s-anino Hönigsberg per belvoĉa kantado partoprenis kaj recito de la poemo „Himno al Kahlenberg" (de la viena poeto Weinheber) de s-anino Sascha Schamanek, estis sekvita de komuna kantado de multaj konataj vienaj kantoj.

R. Cech.

Edvard Grieg-festhoro

La Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto okazigis en la feste iluminita salonego de la ĝenerala poŝtdirekcio de Vieno memorhoron por la famkonata komponisto Edvard Grieg kun arta programo kaj posta parolado de samideano kalkulkonsilisto R. M. Frey, kiu elokvente priskribis la neceson pri enkonduko de internacia lingvo kaj tiucele la altan valoron de Esperanto.

La aranĝon partoprenis ankaŭ distingaj personoj el ministerioj, eklezio kaj diplomatio kaj tiamaniere la scio pri Esperanto estiŝ semata en novaj societaj rondoj. Pro la sukcesplena aranĝo meritas s-ano R. M. Frey dankon kaj rekonon.

Sindikata organo okupiĝas pri Esperanto

La organo por Klerigaj Funkciuloj de la Aŭstria Sindikata Ligo, en la eldono de Aprilo 1948 malfermis diskuton pri la mondlingva problemo. Unu alskribajo estas por Esperanto, la alia pledas por la angla lingvo. La diskutado estas daŭrigota en la sekvonta kajero.

Fervojista fakgrupo — Depost 19. II. 1948 okazis en la domo de la „Generala direkcio de aŭstriaj fervojoj", Wien I., Elisabethstraße 9, prepara kurso por ia ŝtata ekzameno. Partoprenas 20 personoj. La kursejon senpage disponigis la Generala direkcio. S 500.— subvenciis la Fervojista sindikato. Al ambaŭ institucioj ni kore dankas. Por aŭtuno estas en preparo Esperantokursoj en kadro de la Fervojista sindikato en tuta Aŭstrio. La membroj de la fakgrupoj instigu jam nun la lokajn sindikatajn grupojn, prepari la kursojn. Dum la kongreso de la Aŭstria Sindikata Ligo la 18.—24 V. 1948 la fervojista fakgrupo aranĝos same kiel pasintan jaron, Esperantoekspozicion, kaj disponigos al la kongreso interpretistojn por diversaj naciaj lingvoj el la fakgrupa membraro. Pri fondo de Tutmonda Fervojista Ligo estos dikutata dum hungara landa Esperantokongreso dum pentekostoj en Györ, Hungario, kaj daŭrigota la temo dum la Sat-Kongreso en Amsterdamo. La nunjara renkontiĝo de la fervojista fakgrupo okazos dum la Aŭstria Esperanto-Kongreso la 14. VIII. 1948. Posttagmeze je la 14-a organiza kunsido kaj vespere je la 20a h solena vespero, aranĝota de la fervojista fakgrupo, al kiu estas ĉiuj kongrespartoprenontoj kore invitataj. La fakgrupaj membroj pagos la saman kongreskotizon kiel la aliaj partoprenontoj t. e. 10.— S (familianoj 5.— S). Ĉiuj iamaj esperantistaj fakkolegoj bonvolu anonci la aliĝon al la fakgrupo: Josef Hawla, Wien III., Grasbergergasse 4 XIII/1/9, aŭ al la landaj delegitoj. Ge-kdoj, preparu jam nun la laboron por aŭtunaj kursoj en viaj lokoj! Radiodissendoj de la fakgrupo okazas ĉiun duan merkredon en la monato je la 6.30 h., Wien.

E-grupo „Harmonio" — Wien XV. La grupo okazigis la 19. III. 1948 sian jarkunvenon. Grupestro s-ano E. Vokal raportis pri la stato de la E-movado en Aŭstrio kaj eksterlando kaj fine konstatis, se ankaŭ la cirkonstancoj en Aŭstrio por Esperanto ne estas favoraj, tamen baldaŭ venos nia tempo kaj la venko de nia ideo.

S-ano G. Loibel raportis pri la grupvivo. Okazis entute 51 kunvenoj kun 1592 vizitantoj, krome 3 festetoj, 18 paroladoj, 12 prelegoj, 7 letervesperoj,

6 konversaci-vesperoj kaj 4 tradukaranĝoj. Ankaŭ la kantado estis vartata. Estis instalataj 2 kursoj por komencantoj kaj 2 kursoj por progresintoj. Dum somero la grupanoj gaje partoprenis ekskursojn. Diversaj s-anoj el la federaciaj landoj kaj el eksterlando vizitis la grupon.

S-anino M. Loibel raportis pri la membrostato. Fine de 1946 la grupo nombris 54 anojn kaj nun ĝi havas 61.

Pri la grupa kaso raportis s-anino Ohrenberger kaj pri la biblioteko s-anino Schuh. Ĝi enhavas 99 librojn. Post raporto de la kontrolo la kunveno liberigis la eksiĝontan estraron de la respondeco.

La novelekto rezultigis la unuanimanreelekton de s-ano E. Vokal, estro kaj s-ano G. Loibel vicestro kun listo de ceteraj estraranoj.

Grupestro Vokal promesis daŭrigi la aktivan agadon de la grupo, por ke „Harmonio" ankaŭ estonte restu unu el la plej laboremaj grupoj de Vieno.

E-grupo „Konkordo" — Wien X. — Dum la someraj monatoj la grupo kunvenas ĉiun mardon de la 18.30—21-a h. en Wien X., Wielandgasse 16. La grupejo estas atingebla tra la korto. La grupanoj estas invitataj regule partopreni la gruvesperojn kaj gastoj estas bonvenaj.

Viena Esperantista Delegitaro

Restarigita jam en aŭtuno 1945 funkcias VED kiel landa organizo de AEF por Wien. La regulaj kunsidoj okazas ĉiun unuan merkredon en la monato je la 18-a h. en la Esperanto-centro. La vienaj E-grupoj estas insiste petataj sendi al la kunsidoj po du delegitoj kaj informi siajn anojn pri ĉiuj okazintaĵoj en la kunsidoj priparolitaj. En la Marto-kunsido estis elektata nova estraro de VED. Estro fariĝis s-ano E. Vokal.

Por ĉi-jara aŭtuno estas preparata vastskalaj kursaranĝoj. Jam nun klopodu ĉiu grupo tian aranĝon, zorgante pri instruanto kaj taŭga ejo. Volonte estas akceptataj proponoj kaj sugestoj por pli intensigi la vienan E-movadon.

E-societo „Danubio", Wien. — Kunvenoj okazas ĉiun duan kaj kvaran lundon en la monato je la 18.30-a h. en la gastejo Zboril, Wien VII., Sigmundgasse 14. La 22. II. 1948 estis aranĝata la jara ĉefkunveno. Post kontentigaj raportoj pri societagado, kasostato kaj biblioteko okazis la novelekto de societestraro. Estro fariĝis ree la de ĉiuj altŝatata s-ano Raimund Cech. La kunvenintoj decidis aktive kunlabori en ĉiuj institucioj de AEF kaj en la „Österreichische Gesellschaft der Freunde des Esperanto" (Societo de la Amikoj al Esperanto). Membrostato de la societo: 46 aktivaj kaj 10 akcelantaj.

Esperanto en la metilernejo de Innsbruck

Kvazaŭ nur hazarde per letero ni eksciis, ke en Innsbruck, Tirol, kreiĝis grava antaŭlaboro por nia komuna devizo: „Esperanton en la lernejojn!"

Sen granda reklamo kaj bruo, sed per praktika laboro, enkondukis la estraranode AEF, s-ano d-ro Karner, Esperanton en la fakan lernejon de la elektrometio en Innsbruck, kie li mem instruas.

El la 350 metilernantoj el la tuta lando Tirol 125 lernantoj regule partoprenas la nedevigan instruadon de Esperanto! Kvankam multaj el la Esperanto-lernantoj ĉiutage devas fari sufiĉe longan fervojveturon al Innsbruck, ili tamen krom la ordinaraj 9 instruhoroj oferas pluan horon por la studado de Esperanto.

Tiu ĉi granda sukceso honorigas ne nur la senlacajn klopodojn de s-ano d-ro Karner, sed ĝi ankaŭ respegulas la lernemon de la metilernantoj.

Nun decas montri al la junaj adeptoj de Esperanto la praktikan valoron de la lingvo por pluinstigi ilian lernfervoron. Skribu tial multajn leterojn aŭ kartojn el la en- kaj eksterlando al la: Esperantokursteilnehmer der Fachl. Gewerbl. Berufsschule für das Elektrogewerbe (Dr. Karner), Innsbruck, Innallee 3, Aŭstrio.

En Burgenland Esperanto marŝas

Sub la fervora agado de s-ano J.

Rainer, Oberpullendorf, lastatempe estiĝis kelkaj E-kursoj kaj nome en Oberpullendorf, Unterpullendorf, Deutsch-Kreuz kaj Eisenstadt. Pluaj kursoj estas planataj en Mattersburg kaj Lackenbach. — Ni gratulas al la AEF-landestro de Burgenland, s-ano H. Bauer, al s-ano J. Rainer kaj iliaj helpantoj pro ilia vigla laboro kaj deziras al la kursoj bonan sukceson.

E-societo „Unueco" — Graz

Nia societo nombris ĝis la 31-a de Marto 1948 75 membrojn.

Dum la vintro okazis regule ĉiuvendrede la konversaciaj vesperoj, kvankam ofte nur ĉeestis malmultaj samideanoj pro la fakto, ke ni ne disponis pri karbo kaj ligno.

La nova adreso de nia kunvenejo estas: Graz, Stempergasse 6, unua etaĝo dekstre. Nun ni kunvenadas ĉiulunde de la 19-a horo ĝis la 22-a.

Por la ĉijara Aŭstria Esp.-kongreso en Linz jam nun interesiĝas multaj societanoj.

Nekrologo

La 18-an de Marto 1948 mortis nia honorata membro s-ano Karl Hackl, em. kolonelo, iama prezidanto de la Esp.-Societo por Stirio. Kun la mortinto nin forlasis ŝatata kamarado kaj precipe la malnovaj amikoj perdis kun li karan homon kaj lertan pioniron. La tuta anaro de la Esperanto-Societo „Unueco" en Graz ĉiam bone memortenos s-anon Hackl kaj esprimas al la estimata vidvino sian koran kondolencon.

Universala Esperanto-Asocio

Dum la 32. Universala Esperanto-Kongreso en Bern 1947 okazis la kunfandiĝo de ambaŭ gravaj nepolitikaj internaciaj Esperanto-organizoj UEA kaj IEL. Prezidanto fariĝis la konata sveda E-pioniro Malmgren; direktoro estas s-ano Goldsmith kaj redaktoro de la organo „Esperanto" fariĝis s-ano H. Jakob. La centra oficejo troviĝas en Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Ĉefdelegito de UEA por Aŭstrio estas s-ano Rajmund Cech, Wien VII., Lindengasse 8/11, kiu volonte informas ges-anojn, kiuj deziras aliĝi. Kotizoj por 1948: S 10.— (membreco kaj jarlibro); S 25.— (membreco, jarlibro, organo „Esperanto"); S 50.— por membro-subtenantoj. La ges-anoj en la liglandaj lokoj estas petataj transpreni la oficon de UEA-delegito, vicdelegito aŭ fak-delegito.

Kristana Frataro — aŭstria reprezentanto

S-ano Alois Hilkersberger, Lotzweg 1, Haus „Espero", Landeck, Tirol, transprenis por Aŭstrio la reprezentadon kaj pagejon de la Kristana Frataro havanta sian centran sidejon en London 13, 21 Mitchell Road, Palmers Green, Anglujo. Informojn pri la celoj de la Kristana Frataro petu (kontraŭ reafranko) de la nomita reprezentanto.

Holandaj floroj en Vieno

En Aprilo lumis multkoloraj tulipoj en ĝardenaj bedoj sur la „Praterstern" (grava trafikplaco en la 2-a distrikto) kaj allogis la admirantajn rigardojn de ĉiuj preterpasantoj. Kontraste al tiu peco de rava beleco estis en la fono de la bomboj detruita norda stacidomo kaj ĉirkaŭaĵo. Sur tabuleto oni povis legi, ke la tulipoj estis donaco de la holanda flor-bredista unuiĝo por la vienanoj.

En mondo, kiu ankoraŭ estas plenigata de disputoj kaj malamo, tiuj floroj estis simbolo de la amo kaj amikeco kaj prezentis afablan saluton de lando al lando. Jes, karaj holandanoj, tian okupadon de aŭstria tero ni ĝoje salutas kaj libervole toleras ĝin senfine.

Gandhi-memormarkoj estos presataj en Vieno

La Viena ŝtatpresejo ricevis radiogramon el Nov-Delhi, ĉu ĝi akceptus la pretigon de serio da Gandhi-memormarkoj. La ĝenerala poŝtdirektoro de Nov Delhi anoncis la sendon de altranga poŝtoficisto pro detalaj intertraktadoj kaj pri ofertoj de pluaj hindaj poŝtmarkoj. La aŭstria ŝtatpresejo tuj deklaris sin preta transpreni la produktadon de la markoj.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

La laboristaj Esperantistoj festis la Unuan de Majo

La Unua de Majo, la granda festo de la tutmonda laboristaro vidis ankaŭ la laboristajn Esperantistojn de Vieno sur la manifestejoj. Pli ol sesdeko da ALE-anoj sekvis al la alvoko de la estraro por la partopreno ĉe ambau laboristaj demonstracioj. Tri ruĝaj flagoj, ornamitaj per nia verda Esperantostelo, flirtis al la marŝantaj gekamaradoj antauen, kaj la vizaĝoj de la gekamaradoj brilis pro la ĝojo, kiun ili sentis pro la sukcesa, komuna agado. Per ruĝaj brakrubandoj, provizitaj per la stelo, ili logis al si la atenton de la laborista publiko, spalirstaranta dense flanke de la manifestantoj. Jen kaj jen Esperantistoj, troviĝantaj en la spaliro, salutis niajn gekamaradojn per laŭta „Saluton!" kaj „Vivu Esperanto!" kaj ili ofte enviciĝis en nian grupon. Nia ruĝa standardo, portanta la devizon „Per Esperanto por socialismo' estis ripete kaj spontanee aplaŭdata de la rigardanta laborista amaso. Granda estis la entuziasmo de niaj manifestantaj gekamaradoj kiam iliaj parolhoroj trovis fortan aklamon ĉe la publiko. Iliaj vokoj „Esperanto, die Sprache der Völkerverständigung! Mit Esperanto für den Weltfrieden! Esperanto in die Schulen! Esperanto, die zweite Sprache der Arbeiterschaft!" denove kaj denove eksonis kaj videble trovis grandan eĥon. Ankaŭ per la megafoninstalaĵoj, kiuj estis funkciigataj laŭlonge de la Ringstrato, nia delegacio estis menciata kaj salutata.

La gekamaradoj, marŝantaj en la manifestacio de la Komunista Partio notis kun granda ĝojo, ke la tuta Centra Komitato de la Partio fervore aplaŭdegis, kiam nia delegacio preterpaŝis, salute svingante niajn flagojn.

Oni distribuis flugfolioĵn, kiuj klarigis pri Esperanto kaj ties graveco en la nuna situacio kaj oni ankaŭ varbis por la utilega kaj ĉiel subteninda instrugazeto „Die Weltsprache".

Resumante ni povas konstati, ke ankaŭ en tiu ĉi jaro la partopreno de la ambaŭ laboristaj manifestacioj estis sukcesa. Sukcesa laŭ la propaganda efiko kaj — laŭ la firmigo, kiun ĝi donis al ni ALE-anoj de Vieno, konsciigante al ni, ke la komuna, unueca laboro estas la garantio por nia prosperado. Tiu ĉi agado donis al ni fortan impulson por pli energie antaŭenpaŝi en nia movado.

La sekvantan tagon estis komuna eksurso al Viena Arbaro, kiun partoprenis 55 geesperantistoj. Komune ni solenis la gravan feston per parolado, poemoj kaj laŭtlegado el „Internacia Kulturo" pri „La Unua de Majo 1944 en Ateno". Finante tiun solenaĵon ni kantis la „Kanton de la Laboro" kaj la „Internacion".

ALE eldonis sian unuan broŝureton

Antaŭ la Viena Esperantokonferenco aperis rezulte de la sindona dediĉo de k-do Haiderer, kiu faris la kompostan kaj ĉiujn akcesorajn laborojn, nia 16-paĝa broŝureto pri la demando „Ĉu militoj estas eviteblaj?", verkita de k-do Hugo Kraus. Gi entenas en plej konciza formo nian pozicion al tiu demando. La prezo, inkluzive sendkostoj estas 60 groŝoj por la aŭstrianoj kaj por eksterlandanoj unu respondkupono. Arta desegnaĵo de k-dino Gaugitsch ornamas la titolpaĝon. Ni invitas ĉiujn ALE-anoĵn kaj la ceterajn Esp-istojn, ke ili senprokraste mendu ĝin persone au per la ALE-delegitoj en siaj grupoj kaj petas ilin fari propagandon por la akiro de nia eldonaĵo, por ke per tio ili helpu plibonigi nian financan bazon!

S. P. Ö. — Laborista Esperantistaro „Nia Vojo“

La E-grupo „Nia Vojo“ transprenis la taskon oficiale funkcii kiel elita taĉmento de la socialista sekcio de Aŭstria Laborista Esperantistaro (A. L. E.). Tial ĉiuj demandoj, proponoj, manuskriptoj por „I. E. S.“, „Interligilo“ kaj Aŭstria Esperanto-Revuo (S. P. Ö.-tendencaj) estu sendotaj al la estro Lugwig Sager, Wien XVI., Maderpergerstraße 14/12.

Socialistaj Esperantistoj aliĝu al A. L. E.

La S. P. Ö.-sekcio de ALE apelacias al ĉiuj socialistaj Esperantistoj aliĝi al ALE. Komprenu la taskojn plenumendajn de ni inter la partio kaj sindikatoj rilate al la Esperanto-movado kaj tial fortigu per via aliĝo nian laboristan movadon en ALE!

Adreŝanĝo de „Nia Vojo“ — La E-grupo depost 1. IV. 1948 ŝanĝis sian ejon. La nova adreso kaj kunvenejo estas: Wien XVI., Wattgasse 15 (angule de la Ottakringerstraße). Kunvenoj ĉiuvendrede je la 19a h. kun varia programo.

SAT-helpantoj anoncu vin!

Pri SAT-helpantoj legu en A. E. R. n-ro 10—12/1947 pĝ. 168.

Por la urbo Salzburg anoncis sin kiel helpanto k-do Ensmann Lois (24.954), Salzburg, Dreifaltigkeitsgasse 4/III r.

SAT-helpanto por Niederösterreich, k-do Mayr Franz (24.956) ŝanĝis sian loĝejon. Nova adreso: Pöchlarn, Brunn n-ro 57, N.-Ö.

Kiam anoncos sin gek-doj el aliaj liglandoj kaj urboj de Aŭstrio por kunlaboradi kiel helpantoj?

Karavano aŭstria al la SAT-kongreso en Amsterdam

La karavano ekveturos vendrede la 30. VII. 1948 je la 8a matene de Wien-Westbahnhof trans Köln—Passau al Amsterdam (sen ŝanĝi la vagonon!), kie ĝi alvenos sabate la 31. VII. 1948 tagmeze.

La veturprezo Wien—Amsterdam tien kaj reen estas ŝ 340.— pagenda en aŭstriaj ŝilingoj. La fervoja veturbileto validas dum unu monato.Tial estos eble reveturante interrompi la veturadon por partopreni nian Aŭstrian Esperanto-Kongreson en Linz (12.—15. VIII. 1948).

Pasporton ĉiuj karavananoj espereble jam ekhavis, ĉar alie la tempo jam estus tro mallonga por havigo kaj partopreno al la SAT-kongreso duba.

Komunikoj de la SAT-peranto por Aŭstrio

A d r e s o: Ludwig Sager, Wien XVI., Maderspergerstraße 14/12; poŝtŝparkasa konto n-ro 193.114.

Sciigo al multaj skribintoj al la SAT-peranto

Pro mia pli longa malsano, la alvenintaj skribaĵoj el en- kaj eksterlando amasiĝis sur mia skribotablo. Tial mi petas pardonon, ke la respondo mia daŭris kaj daŭros iom pli longe, ĉar mi tute ne estas kapabla plej baldaŭ respondi al ĉiuj, kiuj skribis al mi lastatempe. Mi certe neniun neglektos, sed nur povos respondi dum mia tre mallonga eksterdeĵora tempo laŭvice aŭ laŭgrave. La Vienaj SAT-anoj povas paroli kun mi ĉiuvendrede en la ejo de „Nia Vojo“ XVI., Wattgasse 15.

SAT-kotizo 1948 kaj 1949

La gek-doj, ankoraŭ ne pagintaj la jarkotizon 1948 (ŝ 15.— kun „S-ulo“) aŭ pagintaj nur parton de ĝi, estas petataj plej baldaŭ ordigi la aferon. Sed enpagu n u r je la poŝtŝparkasa konto n-ro 193.114, L. Sager, Wien.

Al diversaj gek-doj mi komunikas, ke ĝis nun ankoraŭ ne estas eble pagi la kotizon por 1949, ĉar ĝi estos fiksata nur en la lasta kvartalo de 1948 kaj ĝustatempe publikigata.

SAT-insignoj

Ili jam estas haveblaj ĉe la peranto kaj kostas po ŝ 3.—. La insignoj estas rondaj emajlitaj diametro 16 mm, verda stelo sur blanka fono kaj ruĝa rando kun ora surskribo „Esperanto“ — „SAT“. Broĉoj aŭ pingloj. Vienaj SAT-anoj povas aĉeti ilin ĉiuvendrede en la SAT-kunveno XVI., Wattgasse 15.

La SAT-anoj el la provinco mendu la insignojn ĉe la SAT-helpanto en la respektiva liglando, kiu kolektive mendu ĉe la peranto en Wien.

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Ĉefepiskopo D-ro Andreo Rohracher protektas Esperanton

Lia eminenco d-ro A. Rohracher, ĉefepiskopo de Salzburg akceptis la protektoraton pri la ligo de la aŭstriaj katolikaj Esperantistoj en sia diocezo Salzburg kaj partoj de Tirol. Li donis aŭdiencon al pastro Kaps, katedrala vikaro de Salzburg, kiu fondis kaj nun gvidas la K. E. L. de la diocezo, kaj esprimis sian ĝojon pri la fondo, celo kaj agado de la katolika E-movado. La ĉefepiskopo de Salzburg tiamaniere aliĝis al la aliaj altrangaj ekleziuloj, favorantaj kaj akcelantaj Esperanton, kiel kardinalo d-ro Th. Innitzer kaj lia antaŭulo kardinalo d-ro Piffl.

Ĉefepiskopo d-ro Rohracher ankaŭ estas membro de la „Societo de la Amikoj al Esperanto".

La Aŭstria Katolika Ligo Esperantista celas sur tute religia bazo propagandi kaj apliki Esperanton, instigita de la plej alta ordono Dia: Amu Dion kaj vian proksimulon.

Katolika Esperanta Manifestado en Romo

La 9. XI. 1947 oni solenis en la fama salono de la Franciskana Katedralo la tagon de la katolikaj Esperantistoj. Partoprenis pli ol 500 personoj. Inaŭgure okazis sankta meso en la basiliko de St. Antonio, en kiu pastro P. Carolfi predikis Esperantlingve. Estis ankaŭ eldonita arta memorkarto. Multaj personoj enskribiĝis en E-kursoj.

P. d-ro J. B. Kao nun agadas en Nanking

Pastro d-ro J. Baptisto Kao nun loĝas en la ĉefurbo de sia hejmlando Ĉinujo. La nova Apostola Internuncio vokis lin tien sur posteno de direktoro de la Lerneja Sekcio de la Katolika Centra Oficejo kaj P. Kao estas preta korespondi kun s-anoj el ĉiuj landoj pri edukado, literaturo, sociaj problemoj kaj religiaj aferoj. Baldaŭ li devos iri al Shanghai. Lia tiea adreso estas: 141, Chungking Road, Touthern, Shanghai, China.

Paroladoj ĉe AKLE

Vizitis nian grupon en Wien s-ano E. Werner de la Esperanto-centro. Li parolis pri la sekvonta laboro sur la kampo Esperanta kaj petis pri aktiva kunlaborado.

S-ano pastro P. d-ro Bruno Hebenstreit, franciskano el Graz, kiu faris la Esperanto-predikon okaze de la Burgenlanda Esperanto-tago pasintjare, rakontis pri sia uzo de Esperanto dum la milito en Bulgarujo.

Katholische Pressezentrale (Katolika gazetara centro) Wien I., — interesiĝas pri Esperanto, petis raporton pri la katolika Esperanto-movado en Aŭstrio kaj publikigis detalan raporton pri ĝi por la katolika gazetaro.

Katolikaj gesamideanoj de Wien — kunvenas ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato de 17—19.15 h. en la hejmo de „Kreuzbund", Wien I., Graben 13/II. Programo: perfektiga instruado; kursgvidanto: s-ano L. Siedl. Poste parolado, raportoj, prelegoj, komuna kantado.

Kardinalo Princo Sapieha favoras Esperanton

Prof. M. Sygnarsky, Krakovo, raportis en „Espero Katolika" 1/1948, ke li en Sept. 1947 havis aŭdiencon ĉe Lia moŝto Kardinalo Princo Sapieha en Romo kaj eluzis ĉi tiun okazon por informi la eklezian princon pri la katolika Esperanto-movado. La kardinalo kun

intereso akceptis la raporton kaj promesis sian helpon por la movado.

Vortoj de la majstro

(Dum kongreso de katolikaj gejunuloj) „Mi estas nur malgrava judo, kiu amas la tutan homaron, sed kio estas pli bela ol vivi laŭ instruoj de Jesuo Kristo". (Laŭ E. K.)

Nova estraro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Prezidanto: P. Heilker (Nederlando); sekretario-kasisto: L. G. C. de Jong (Nederlando); vicprezidanto: sac. A. Beckers, vikario (Belgujo); membroj: sac. J. Vernoux S. C. J. (Francujo); N. W. Vigar (Anglujo); Fr. Kudrna (C. S. R.); d-ro Max. Führing (Aŭstrio).

En la mondo estas malhela, lumi ni devas, vi en via angulo kaj mi en la mia!

Nekrologo

La 14. IV. 1948 mortis 81 jara pastro P. Wolfgang Nedwid, O. S. B., senioro de Schottenstift (Skota abatejo) en Wien. La mortinto havis grandajn meritojn pri la Esperanto-movado en katolikaj rondoj. Dum 10 jaroj li estis aktiva prezidanto de la Katolika Unuiĝo Esperantista de Vieno, eldonis la bultenon „Informoj" kaj grave helpis en la Internacia Katolika Esperanto-Kongreso 1924 en Vieno. Pli ol 60 jara li faris la tiam ĵus enkondukitan ŝtatan Esperanto-ekzamenon pri instru-kapableco kaj li aranĝis la Di-servojn por la katolikaj Esperantistoj. Li mem kutime predikis kaj celebris la sanktan meson en la Minoriten-preĝejo. Krom multaj aliaj pastraj oficaj laboroj li tiom dediĉis sin al la agado por Esperanto. Lia modela ekzemplo estu por ni ĉiam memorinda kaj imitinda. AKLE ankaŭ profunde kondolencas al Schottenstift, kie li kreis dum jaroj indan hejmon por la katolikaj Esperantistoj. Dio donu al li eternan pacon! W. M.

La martiro de d-ro M. J. Metzger

Por la paco de Kristo kaj la unueco de la eklezio mortis la 17. IV. 1944 en Brandenburg (Germanujo) d-ro Max Josef Metzger, nomita „Frato Paŭlo", mortigita de la nacisocialistoj pro de li entreprenita agado por la paco. D-ro M. J. Metzger ankaŭ estis Esperantisto kaj iam li eldonis la periodaĵon „Katolika Mondo". La katolikaj Esperantistoj lin daŭre memoros. Li estu antaŭ Dio petanto por la paco de la mondo.

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

(Agadsferoj: lingvo, literaturo, pedagogio, sciencoj.)

Kunvenprogramo de la Aŭstria Esperanto-Instituto ĉe la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz, la 13an kaj 14an de Aŭgusto 1948.

1. Dir. d-ro Grimme: Celoj kaj taskoj de la AEI.
2. Sekr. Werner: Raporto pri la lasta jaro.
3. Reelekto de la Instituta estraro.
4. Parolado de prof. d-ro Sirk: Ĉapitro el la historio de Esperanto.
5. Diskutoj:
   a) Lingvaj demandoj (ĝeneral-interesaj temoj);
   b) La plej bona metodo instrui Esperanton.
   (Interŝanĝo de opinioj kaj spertoj de kursgvidantoj).

Proponoj pri a) kaj b) estas sendotaj al la sekretario ĝis fino de Julio.

Raportoj:

1. En la ŝtataj ekzamenoj pri scipovo de la lingvo Esperanto komence de Majo 10 geesperantistoj sukcesis, 2 kun distingo.

2. Laŭ deziro de la direkcio de la ŝtata ekzamenkomisiono en la instruministerio ni petas la grupestrojn kaj

kursgvidantojn zorgi pri tio, ke kapablaj Esperantistoj faru la ŝtatan ekzamenon, ĉu instruistan aŭ pri lingva kapableco, sed nur post sufiĉa preparo, por ke la komisiono ne estu devigata, rezignigi kandidatojn ĉe la ekzameno.

3. Ankau laŭ spertoj ĉe la ŝtataj ekzamenoj, la kursgvidantoj bonvolu atente zorgi pri la ĝusta elparolo de Esperanto.

4. Por prezenti pri la aŭstria literaturo paroladetojn en Radio aŭ artikoletojn en la „AER", ĉiuj kunlaboremuloj estas petataj ensendi manuskriptojn, kiujn oni povas laŭtlegi aŭ en kvin aŭ en dek minutoj, kun mallonga biografio pri aŭstria verkisto kaj tradukprovaĵo pri unu el liaj karakterizaj verkoj.

5. Rilate al ortografia projekto de pastro Kubacki-Milwaukee, kiu depost kelkaj monatoj bombardas la Esperantistaron per reformproponoj, anstataŭigi la supersignitajn literojn per x, q, y, w aŭ simile, eventuale tute forlasante ĵ kaj h, la Aŭstria Esperanto-Instituto decidis interkonsente kun la direkcio de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esperanto en Aŭstrio, ke ĝi ne trovas konsilinda akceli la reformproponojn nun, kiam la afero de Esperanto estas ankoraŭ en stato de propagando. Cetere la AEI jam unufoje decidis, atentigi pri tio, ke mankantaj supersignoj estu laŭ la „Fundamento" anstataŭigataj per sekvanta „h".

6. Traduktaskoj el la lasta tempo, por kies plej bona solvo ni alvokas la kunhelpon de ĉiuj lingvospertaj samideanoj:

a) Kiel oni tradukas „Marterl"?

b) Kiel oni tradukas la sekvantan frazon: „Der Ernährungsminister verwies auf die Mängel in der Eigenaufbringung und zeigte an Hand der Unterlagen, daß dem Land die notwendige Hilfe zuteil wurde."

7. La Argentina Esperanto-Ligo donace sendis al AEI paketon da vestaĵoj. Ili estas disdonitaj inter la plejbezonantaj kunlaborantoj. Ni korege dankas al la bonkoraj donacintoj, kiuj tiamaniere pruvis la universalan Esperantistan solidarecon.

Alvoko al kursoj!

La estraro de la Aŭstria Esperantista-Federacio kaj de la Aŭstria Esperanto-Instituto, konsciante, ke nia movado kreskas nur per novaj adeptoj, kiuj devas lerni kaj apliki la lingvon, apelacias al ĉiuj esperantistoj, kiuj kapablas instrui Esperanton ke ili ĝustatempe preparu kursojn en aŭtuno.

Sekvu jenajn regulojn:

1-e: La kursgvidantoj estu ŝtate ekzamenitaj, almenaŭ pri la scio de Esperanto. Por la instruado en publikaj lernejoj necesas la ekzameno pri instrukapableco. Detalajn informojn pri ekzamenaferoj donas, petite, la Aŭstria Esperanto-Instituto.

2-e: La kursoj komenciĝu fine de Septembro aŭ komence de Oktobro kaj daŭru 4—6 monatojn. Prefere instruu dufoje en la semajno po unu horon ol nur unufoje duoblan horon.

3-e: Aranĝu ankaŭ progresintajn kursojn.

4-e: Kiel lernilojn uzu la eldonaĵojn de nia Esperantoeldonejo „Tramondo":
a) Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen,
b) Handwörterbuch Esperanto-Deutsch,
c) Handwörterbuch Deutsch-Esperanto (nun presata),
d) „Senhalte al la celo" facila legolibro,
e) „Tri majstronoveloj" (por progresintoj),
f) „Die Weltsprache", kiu enhavas ekzercaĵojn por komencantoj kaj progresintoj.

5-e: Instigu ne nur al lernado, sed ankaŭ al apliko de Esperanto, almenaŭ per internacia korespondado, aŭskultado de esperantlingvaj Radiodisaŭdigoj ktp.

6-e: Kunigu la novajn lernantojn en konversaciaj rondoj kaj formu el ili novajn grupojn de AEF!

Internacia ESPERANTO-MOVADO

33-a Universala Kongreso de Esperanto
Malmö, Svedujo, 31. VII.—7. VIII. 1948

Kiel ni jam atentigis en la antaŭa numero de AER, ne estas eble havigi por pli granda nombro da aŭstriaj partoprenemuloj svedan valuton per la nacia banko. Tial ĉiuj pluaj petoj tiurilataj estas superfluaj.

Por la kongreso jam anoncis sin multaj geesperantistoj el tutmondo kaj versâajne ĝi same estos tiel impona manifestacio internacia kiel la U. K. en Bern pasintjare.

1-a Danubvala Konferenco Esperantista

Inter la Esperantistaj Asocioj de la Danubvalaj landoj estas projektita Danubvala Konferenco de la 22.—25. VII. 1948 por pritrakti la problemojn pri plivastigo kaj oficiala akcelado de Esperanto en la nomitaj landoj.

La aranĝon de la konferenco transprenis la Hungara E-Societo kaj ĝi jam en Februaro n. j. dissendis invitilon al la respektivaj landoj. De la landaj organizoj partoprenu 4—5 delegitoj.

Internacia Industria kaj Komerca Entrepreno en Hungarujo

En Budapest fondiĝis entrepreno intencanta organizi sian laboron sur internacia tereno. Gi aĉetas, vendas kaj peradas diversajn varojn kaj per tio kreas la necesajn intern. komercajn rilatoin. Al la entrepreno povas aliĝi kiu ajn industriisto, komercisto aŭ eksport-importaj firmaoj. Esperantistaj perantoj en ĉiuj landoj serĉataj. Interesiĝantoj skribu al: Internacia Industria kaj Komerca Entrepreno, Stefano Csurgai, Budapest IX., Üllöfi-Str. 89/A, Hungarujo.

Sovet-Unio — eldonis en 1947 serion da 10 ilustritaj poŝtkartoj kun bildoj el la fama Moskva galerio Tretjakovskaja Galerija, kiuj portas la Esperanto- surskribon: „Pośta karto".

Leuven festos 500-jaran jubileon — Dum la jaro 1948 oni rememorigos en Leuven la 500-jaran datrevenon de la unua ŝtondepono por la urbdomo. Tiuokaze estas preparataj diversspecaj aranĝoj kiel akademia kunveno kun prelegoj de altrangaj personoj, koncertoj, ekspozicio ktp. Prospektoj ankaŭ kun Esperantoteksto estis preparataj. Partoprenemuloj skribu pro detala programo Esperantlingve al: H. J. Boving, Kapusienen Voer, 104, Leuven, Belgujo.

T. J. O. komuniko — Pro la lastatempaj politikaj okazintaĵoj en Ĉekoslovakujo la ĉefperanto tie petis la TJOestraron repreni la mandaton por organizi la Internacian Junularkunvenon. La nomita internacia kunveno tial okazos en Groet, Nederlando, de 3.—10. VIII. 1948.

Portugala Esperanto-Ligo — dissendis komunikon, ke ĝi estas organizo absolute supertendenca, kiu grupigas la tutan Esperantistaron de Portugalujo. En ĝi kunlaboras SAT- kaj UEA-anoj en plena rajtegaleco. Pro tio PEL aliĝos al neniu el la ekzistantaj internaciaj E-organizoj. Adreso: Portugala E-Ligo, Apartado n-ro 125, Lisboa — N.

7-a Internacia Belga Artsemajno — okazos de 31. VII.—8. VIII. 1948, organizita de la belga Ministerio de Publika Instruado. Sub kompetenta gvidado estos montrataj vidindaĵoj antikvaj, modernaj, artaj kaj historiaj. Petu en Esperanto pluajn informojn de: Prof. P. Montfort, Tervurenselaan 310, Woluwe, Brussel, Belgujo.

Komercistaj Esperantistoj — Oni klopodas denove kolekti la komercistojn Esperantistajn. S-ro Richard Levin,

Propaganda Fakestro, Foire de Lyon, Rue Menestrier, Lyon, Francujo, starigas liston de komercistoj kiuj volas uzi Esperanton en negocaj aferoj. Petu de li informojn kontraŭ respondkupono.

Internacia migranta propagandgrupo

Estas planate, ke grupo de diverslandaj Esperantistaj junuloj bicikle migrados dum la someraj monatoj tra Okcident-eŭropaj landoj kaj faros prelegojn, paroladojn, diskutojn, vizitos lernejojn, lokajn E-grupojn ktp. Junaj, la lingvon bone parolantaj Esp-istoj skribu tuj kaj detale pri siaj libera tempo, financa kapablo al kaj petu informojn de s-ro George Sores, c/o. M. Klein, Upper Addison Gardens, London —W 14.

Internacian Junulartendaron — dum Junio ĝis Aŭgusto 1948 okazigos la sveda junulara pacasocio, kiu invitas al partopreno la gejunulojn inter 15—25 jaroj el ĉiuj nacioj. La partoprenantoj loĝos en tendoj sur strando de la lago Mäloren proksime de Stockholm. Informojn kontraŭ int. resp. kup. donas: Ungdomens Fredsförbund, Box 811, Stockholm 1, Svedujo.

Illustr. prospekton pri Trenĉin — eldonis parte kun teksto en Esperanto kaj sendos ĝin laŭpete al interesiĝantoj „Slovakatour", loka grupo por vojaĝtrafiko en Trenĉin, Slovakujo, Ĉ. S. R.

La XI. Sokolfestaro en Ĉ. S. R. — La festkomitato eldonis 12 kolor-ilustr. vere belajn poŝtkartojn kun Esperanto-teksto kaj dissendas ilin ĝis elĉerpiĝo. Komitato de Sokol-Kongreso, Narodni 3, Praha I.

Cerri — Esperanto-Servo en Italujo — La nomita servo kolektas ĉiujn opiniojn, kiujn eminentuloj el ĉiuj landoj (politikaj, religiaj, artaj ktp.) diris aŭ skribis pri Esperanto nacilingve aŭ Esperante. Bonvolu laŭeble respondi jenajn demandojn: Familia kaj persona nomo de la eminentulo; profesio, titoloj k. s.; dato de la eldiro; kie troviĝas la originalaĵo; teksto de la diritaĵo; subskribo legebla kaj adreso de la sendinto. Servo-adreso: Corrado Cerri, Casella Postale 89, Varese, Italujo.

Turing-Klubo de Francujo (65, Avenue de la Grande Armée, Paris), kiu jam antaŭmilite tre favoris Esperanton, denove ekprenis la aktivecon por la lingvo kaj provizore jam instalis du E-kursojn, gvidatajn, de s-ro A. Strobel laŭ Cseh-metodo.

Bibliografio

La prahistoria arto.

La Portugala Eldona Rondo aperigis serion da broŝuroj, enkondukantaj en la kulturon. La plimulto el ili prezentas originalaĵojn kaj tradukojn el la internacia literaturo.

La broŝuro „La prahistoria Arto", el la portugala lingvo tradukita de José de Freitas Martins, priskribas la arkeologiajn trovitaĵojn de la grotoj en Francujo kaj Hispanujo kaj montras per bildoj la tie trovitajn desegnaĵojn kaj skulptaĵojn de la primitivuloj. Gi donas ankaŭ mallongan superrigardon pri la koncernaj geologiaj epokoj. La stilo estas klara kaj flua, kontrolita de la Literatura Komitato de F. L. E. Taŭga legaĵo por popolklerigaj rondoj. G-i.

Lajos Zilahy: „Printempo de Morto"

Romano el la hungara tradukita de Ladislao Somlai (Spierer). Aperis kiel 5a Stelo-Libro ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 119 paĝoj, 13 × 20 cm, prezo broŝ. sved. kr. 6.50, bind. 7.25.

Belaspekta libro kun bona papero kaj neta preso. Temas pri hungara verko aperinta 1922 kaj tradukita jam en 18 (!) lingvojn.

Tiu ĉi anticipa konstato jen entenas kvazaŭan rekomendon, kvankam la tendenco de la romano akcentas dekadencon, sed majstre priskribitan.

La leganton iom strange tuŝas la formo de la rakontado: la verkinto igas junan homon surpaperigi unu solan leteron al amiko de sia juneco pri siaj amaferoj en ĉiuj eĉ plej delikataj detaloj — en la reala vivo io neverŝajna.

Ĉiukaze: la enhavo de tiu flue verkita libro kaptas la intereson ek de la unua ĝis lasta linio, vere.

Generale oni povas diri, se oni pretervidas la fakte nur unuopajn neologismojn kaj la efektive nur kelkajn lingvajn malperfektaĵojn, ke la tradukado estas bone kaj lerte prizorgita. La tuta libro prezentiĝas en laŭdinda, facile legebla Esperanto-stilo. Zodel.

La Budhismo — estas 23 paĝa libreto aperinta en la serio „Enkonduko en la kulturon" verkita de Agostinho da Silva, Esperantigita de Jose de Freitas Martins, eldonita de Portugala eldona rondo. Rekomendinda legaĵo pro sia modele bona, klara stilo kaj modera prezo. Aĉetebla en la librovendejo „Tramondo", Wien I., Neutorgasse 9.

„Das Demokratische Totalitätssystem" (Theorie einer neuen Weltordnung) von Y. Shakdany, Dan Edition Tel-Aviv P. O. Box 4111.

La esperantema aŭtoro, kiu en Esperantlingva noto petas ĉiujn legantojn je kunlaboro, skizas en tiu ĉi germanlingva verko unue la evoluon kaj strukturon de la nuna sociordo en la mondo kaj poste deziratan racian ordon kun administraj konsilantaroj por ĉiuj bezonoj de la homa socio. En aparta ĉapitro li grave pledas por la internacia lingvo Esperanto. La teorio estas pure racie komprenebla kaj akceptebla, sed niaopinie ne efektivigebla pro manko de emociaj instigoj kaj realigaj rimedoj. Ĉiuokaze, la interesa libro estas leginda, sed bedaŭrinde, pro devizmalfacilaĵoj, ne havigebla en Aŭstrio.

Pebe.

ATENTIGO DE LA REDAKCIO

Ni devas atentigi nian legantaron, ke la manko de diversaj supersignoj super la literoj s, g, c ktp., precipe grandliteroj, n e estas preseraroj, sed la presejo provizore ne disponas pri la respektivaj Esperantoliteroj. Kvankam laŭ Fundamenta regulo ni devus anstataŭigi ĉi tiujn mankantajn literojn kun supersignoj per aldono de la litero h — ekzemple anstataŭ ĝ skribi gh — ni tamen pro unueco de la presaĵo prefere evitas ĉi tiun skribmanieron, ĉar ĝi ne nur nebone impresus, sed ankaŭ povus erarigi komencantojn en la lingvo.

Ni estas certaj, ke ĉiuj legantoj kapablas spirite anstataŭigi ĉi tiujn mankantajn supersignojn sen miskompreni la respektivan literon, vorton aŭ frazon.

ALARMO!

La ĝenerala sekretario de UNO, Trygve Lie, publikigis, ke li ricevis centojn da leteroj el la tuta mondo, sed ne u n u estis skribita en Esperanto! ! ! (Laŭ „Espero Katolika" 1/1948)

Ĉu ni Esperantistoj, ĉu la Esperanto-organizoj en tutmondo devas toleri tiun preskaŭ ne kredeblan fakton? Ek, gesamideanoj ĉiulande, kaj inundu la skribotablon de la ĝenerala sekretario de UNO per centoj, ne, m i l o j da leteroj kaj poŝtkartoj skribitaj en Esperanto kaj petu lin pri enkonduko de Esperanto en la internaciaj konferencoj kaj kunsidoj de UNO. Ne prokrastu la aferon! Skribu tuj!

Adreso: United Nations, The General Secretary, Lace Success, USA.

Esperanto-Kurse im Herbst:

Wien I., Neutorgasse 9.
Anfänger: Montag, 20. 9. 1948, 17.30 bis 19 Uhr .
Fortgeschrittene: Donnerstag, 2. 9. 1948, 17 bis 18 Uhr. Ernst Werner.

Wien I., Graben 13/II, Kreuzbundheim, Katholischer Esperantisten-Bund.
Anfänger: Dienstag, 12. 10. 1948, 19 Uhr. Walter Mudrak.
Wien I., Postgasse 8, Postgruppe.
Anfänger: Freitag, 17. 9. 1948, 18.30 bis 20.30 Uhr. Wirkl. Amtsrat Kohout.
Fortgeschrittene: Sonntag, 5. 9. 1948, 9.30 bis 11.30 Uhr. Dipl. Kaufmann Semper.
Wien V., Stöbergasse 11, Volksbildungshaus.
Anfänger: Montag, 27. 9. 1948. Rudolf Bouche.
Wien IX., Galileigasse 8, Volksbildungshaus IX und XVIII.
Anfänger: Montag von 18 bis 20 Uhr.
Fortgeschrittene: Dienstag von 18 bis 20 Uhr. Bei Schulbeginn. Hugo Kraus.
Wien X., Wielandgasse 16, durch den Hof.
Anfänger: Samstag, 2. 10. 1948, 16 bis 18 Uhr. Max Ludwan.
Wien XII., Fockygasse 20.
Anfänger: Dienstag, 14. 9. 1948, 18.30 bis 20.30 Uhr. W. Pachmann.
Wien XII., Siebertgasse 7, Kinderfreundegruppe.
Anfänger: Samstag, 2. 10. 1948. Rudolf Bouche.
Wien XV., Markgraf Rüdigerstraße 4.
Anfänger: Donnerstag, 23. 9. 1948, 19 Uhr.
Fortgeschrittene: Donnerstag, 23. 9. 1948, 19 Uhr. Dir. Franz Menacher.
Wien XV., Siebeneichenstraße; im Speisesaal der Werksküche der Hauptwerkstätte der Verkehrsbetriebe.
Anfänger: Dienstag, 21. 9. 1948, 16.30 bis 18.30 Uhr. Hugo Braun.
Wien XV., Diefenbachgasse 36, Touristenverein „Die Naturfreunde."
Anfänger: Dienstag, 5. 10. 1948, 19 bis 21 Uhr. Max Finkenzeller.
Wien XVI., Wattgasse 15.
Anfänger: Montag, 13. 9. 1948.
Wien XVIII., Schopenhauerstraße 49, Volksbildungshaus.
Siehe Wien IX.., Galileigasse 8, Volksbildungshaus.

Peto! Ni intencas aranĝi varbfoiron por Esperanto. Por tio bonvolu sendi bildpoŝtkartojn, gazetojn, prospektojn k. s. Esperantaĵojn al: Junulara Rondo Esperantista (22 a) Düsseldorf, Eintrachtstraße 6, Brita Zono, Germanujo.

Eksterlandaj gesamideanoj estas speciale atentigataj pri la regulaj vienaj Radio-disaŭdigoj per radio Wien ĉiu merkrede je 6.30 (mezeŭropa somera tempo) per sendstacio Wien I (ondo 506 m kaj 25 m). Aŭskultantoj sendu dankpoŝtkarton aŭ leteron al R a v a g, Wien IV., Argentinierstraße 30 a. Ĉiuj informoj pri Aŭstrio estu petataj de la „Aŭstria Esperanto-Centro", W i e n I., Neutorgasse 9.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. Papierzuweisung 101/47/10—12/ Bezugscheinnummer 61/86.

Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9.
16 paĝa broŝuro, eldonita de Aŭstria Laborista-Eksterlando, 1 respondkupono (inkl. afranko).
Prezo: Aŭstrio, —.50 S, (kun afranko —.60 S).

Vbb (Zl. 3216/1947)

.....

.....

En la Esperanto-eldonejo

TRAMONDO

Vieno I., Neutorgasse 9

aperis jenaj Esperanto-libroj:

	aŭstr. ŝil.
„Freude durch Esperanto“, lernlibro de Hugo Steiner	6.—
„Esperanto, Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen“ eldonita de la Aŭstria Esp. Federacio	3.50
„Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes“ prilaborita kaj eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto	6.—
„Esperanto-Deutsch, Handwörterbuch“ (vortaro), eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto, 103 pĝ.	9.—
„Senhalte al la celo“ facila legolibreto de Alois Norbert, 51 pĝ. . .	4.—
„Kantaro de la Aŭstria Esperanto-Federacio“ 24 pĝ.	2.—
„La mondopaco kiel psikologia problemo“ de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk, 36 pĝ.	3.—
„Tri majstronovelo j“ (Kleist: La tertremo en Ĉilio, Storm: Veronika, Stifter: El „La Kondoro“) tradukitaj de E. Pebe. 32 pĝ. . . .	5.50

Krome estas per la librovendejo „Tramondo“ haveblaj jenaj, jam antaŭe aperigitaj libroj:

„Tabeloj por la intua instruado de Esperanto“ de Franz Meŝtan . .	1.50
„La mortado“ de H. Nothnagel, tradukita de B. Selzer, 26 pĝ. . . .	2.—
„La malgranda helpanto“ malmultekosta instru- kaj legolibreto por komencaj Esperantokursoj („Verda Biblioteko“, 1936)	1.50

El „Steffel-eldonejo“, Vieno:

„Junaĝo“, de Anton Stieger, tradukita de F. Th. Bischof . . .	3.—
„La kvar paĝoj de la mondo“, de la sama aŭtoro kaj sama tradukinto	2.—